



PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Pilo-Press aperos
ankaŭ en la sezono
de la "acidaj kukumoj"

Vizitu-la libro-
standon en la
UK-kongresejo!

Eldonanto/Merausgeberi
Ludwig Pidel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 25/74 - 20 jul 1974
Aperas ĉiusemajne

Hamburgo Esperanto-Societo salutas la kongresanojn

Hamburgo. (PP) En sia informilo 3/1974 la Hamburgo Esperanto-Societo publikigas salutvortojn al la partoprenantoj de la 59a Universala Esperanto-Kongreso. Ĝi tekstas:

Koran bonvenon

Inter la 27a de julio kaj 3a de aŭgusto 1974 Hamburgo gastigos la 59an Universalan Kongreson de Esperanto. Estas la 1a Universala Kongreso inter la muroj de nia urbo. Post la 1a kongreso en Boulogne-sur-Mer en 1905 en Germanio okazis Universala Kongreso 1908 en Dresden, 1923 en Nürnberg, 1933 en Köln, 1951 en München, 1958 en Mainz kaj nun en Hamburg. La Hamburgo Esperanto-Societo fondiĝis la 19an de majo 1904. La societo do festas ĉi-jare la 70-jaran jubileon. La estraro de la societo kaj la tuta membraro ĝojas, ke ĝuste en ĉi tiu jaro ni povas gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto kaj per tio ĉirkaŭ 1.800 esperantistojn el 48 landoj de la mondo.

Ni diras al ĉiuj partoprenantoj de la 59a koran bonvenon kaj deziras al ĉiuj belajn tagojn dum la kongreso kaj sukceson en ĉiuj kongresaj laboroj kaj kunvenoj.

Elsbeth Wielgus, 1a prezidantino

Multaj vortoj de rekono por Esperanto

Hamburgo (pp) La simpatiajn salutvortojn de federacia kanceliero Helmut Schmidt, de la alta protektanto pri la UK, ministro Helmut Rohde, de la urbestro de Hamburgo, Peter Schulz, kaj de Nobelpremiito pri paco, Willy Brandt, ni publikigis kune kun la bonvenigaj vortoj de d-ro Werner Bormann, prezidanto de GEA, en speciala antaŭpresado el Germana Esperanto-Revuo n-ro 4/74.

Sed ankaŭ multaj registaroj fare de siaj ambasadoroj en Bonn jam esprimis en leteroj al la LKK siajn salutojn kaj bondezirojn por la kongreso. Ĉi-sekve ni publikigas citaĵojn el kelkaj leteroj:

"Vi vin donis al la nobla tasko plifaciligi la komprenigon inter la homoj. Ĉiu progreso, kiun vi atingos sur la vojo al tiu alta celo efikos sur la vastan kampon kiu estas la komuna zorgo de ni ĉiuj dediĉantaj nin al la afero de pli bona komprenigo inter la membroj de la internacia popolkomuno. En nia lando ni sekvas atente la evoluon de Esperanto kaj konsideras ĝin kiel movadon, kiu allogas la grandanimaĵajn spiritojn.

En la nomo de mia registaro mi deziras al la kongreso plenan sukceson.

Ambasado de Meksikio, Köln

sign. Vicente Sanchez Gavito
Ambasadoro "

C. Bafile, apostola nuncio en Germanio, skribas: "La Sankta Seĝo komisiis min sciigi al vi, ke Li salutas ĉion, kio servas al pli bona interkompreniĝo inter la homaro."

Tre simpatiajn vortojn sendis al la kongreso la ambasadoro de Kanado en Bonn, G.G. Crean, kiuj tekstas i.a. jene: "La temo elektita de vi estas evidente aktuala. La internacia evoluo lasttempe vekis esperojn, ke la solvo de kelkaj malfacilaj problemoj, kiujn alfrontas la mondo de post multaj jaroj, eble jam en antaŭvidebla tempo ekkomenciĝos. Tiaj evoluoj substrekas la faktojn, ke malvastmensa naciismo bremsas la naciojn en iliaj strebadoj por paco kaj justeco en la mondo kaj ke toleremo same kiel la preteco por doni kaj preni estas la antaŭkondiĉoj por transvivo kaj prospero de la homa raso.

Ni nur povas admiri vian obstinon, per kiu vi kaj viaj kunlaborantoj sekvas la celon krei mondlingvon, kiu kontribuas al malpli da miskomprenoj kaj pli favoraj kondiĉoj por vera kunlaboro. La energio kaj sindonemo kiun vi dediĉas al via tasko estas ekzemplo kaj stimulo por ĉiuj, kiuj pledas aktive por la evoluo de harmoniaj rilatoj inter la popoloj."

Samtempe ambasadoro Crean transdonas al la kongresanoj el Kanado siajn plej bonajn salutojn.

La ĉefministro de Nov-zelando, Norman Kirk, transsendis salutemsaĝon al la kongreso fare de la Nov-zelanda Esperanto-Asocio. En sia mesaĝo la ĉefministro substrekas la signifon de Esperanto kiel rimedo por komunikado inter la popoloj.

Inter la multaj aliaj diplomataj salutoj troviĝas ankaŭ tiu de la Ĝenerala Direktoro por la kulturaj rilatoj en la Ministerio de eksteraj aferoj de Hispanio.

Esperanto-prospekto el Hamburgo

Hamburgo (pp) Okaze de la 59a UK Fremdenverkehrszentrale Hamburg (turistoficejo), 2000 Hamburg 1, Bieberhaus, eldonis buntan belaspektan prospekton en Esperanto.

Antaŭkongresaj kunvenoj en Hamburgo

Hamburgo (pp) La kongresejo CCH estos malfermita por la kongresanoj nur vendrede je la 14a horo. Esperantistoj kiuj alvenos en Hamburgo jam la 25 kaj 26 julio povos renkontiĝi en la klubejo de Hamburga Esperanto-Societo "TUS-Heim", von Graffen-Strasse, ekde la 10a h matene jaŭde kaj vendrede.

Aŭstralio koncizaj faktoj

Bonn (pp). En ĉi tiuj tagoj aperis informbroŝuro, eldonita de la Aŭstralio Ambasadato en Bonn, FRG, kun rajtigo de la Ministro pri Komunikiloj, kun la titolo: Aŭstralio koncizaj faktoj.

Laŭ la antaŭparolo la "libreto prezentas kompendian bildon de juna nacio. La progreso de Aŭstralio estas skizita ekde ĝia komenco ĝis la nuna tempo, elmontrante la ekonomiajn, kulturajn kaj sociajn atingojn de la aŭstralia popolo."

La poŝlibreto estas havebla en la diplomaciaj reprezentejoj kaj oficejoj de Aŭstralio en 74 landoj. Formato: 10,5 x 14,7 cm, 88 p.

Jarĉefkunveno de GEA

Hamburgo (pp) La jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio okazos en kadro de 59a Universala Esperanto-Kongreso marde, la 30an de julio, de la 14,30 - 16,00 horo, en la salono "Mybs" de la kongresejo Congress Centrum Hamburg. Al tiu kunveno la membroj de Germana Esperanto-Asocio rajtas eniri ankaŭ sen kongresa karto. Sed estas rekomendinde aĉeti "tagan enirbileton" por 15 GM, kiu rajtigas ĉe-esti la kongresajn aranĝojn dum unu tago.

Postkongresanoj el 19 landoj

Kronach (pp) Por la postkongreso en la nordbavara urbeto Kronach jam aliĝis 117 personoj el 19 landoj.

Aliĝis el: FRG 27, Nederlando 23, Japanio 12, Francio 10, Bulgario 8, Usono 7, Svedio 6, Kanado 4, Aŭstrio 4, Greklando 3, Pollando 3, Belgio 2, Brazilo 2, Aŭstralio 1, Italio 1, Israelo 1, Novzelando 1, Finnlando 1, Sovetunio 1.

Kiel konate la postkongreson de la 4 - 10 aŭgusto organizas la trafikoficejo de Kronach sub la protektado de la urbestro Baptist Hempfling. Por la publika diskutvespero la urbestro invitis letere ĉiujn eminentajn personojn de Kronach.

En la kadro de la postkongreso okazos ankaŭ kunveno de kolektantoj de poŝtmarkoj kaj moneroj.

Por tiuj, kiuj lastmomente decidis partopreni la postkongreson, speciale esperantistoj el Bavario, ni indikas ankoraŭfoje la aliĝadreson: Fremdenverkehrsamt, Esperanto, 864 Kronach, Postfach 510, FRG.

Invita al faka konferenco

Budapeŝto (pp) Laŭ deziro de prof. d-ro Helmar Frank, la fondinto de la Cibernetika Pedagogio kaj ordinario pri Cibernetika Pedagogio en la universitato de Paderborn, FRG, Hermann Behrmann, unua parolanto de la fakgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvocibernetiko" en la internacia asocio pri Programita Instrukcio, invitas al faka konferenco, kiu okazu mardon, la 6an de aŭgusto 1974 en la Keleti-stacidomo de Budapeŝto. Temoj: Eblaj prelegoj de orienteŭropaj sciencistoj dum la Simpozio de la Asocio pri Programita Instrukcio fine de marto 1975 en Nürnberg, FRG, kaj ebla partopreno en la nova plano de prof. d-ro Frank, eldoni komunan aldonon por ĉ. 10 - 20 cibernetikaj aŭ ĝeneral-pedagogiaj revuoj kun Esperanto-resumoj de gravaj artikoloj. Interesuloj sin turnu al H. Behrmann, D-4972 Löhne 1, Bahnhofstr. 54.

Bruno Vogelmann 65jara

Crailsheim (pp) Bruno Vogelmann, la konata komercisto el Crailsheim, festos sian 65an naskiĝtagon la 30an de julio 1974. Esperantisto ek 1926, li dum preskaŭ 50 jaroj fervore laboras por Esperanto. Li estas konata ne nur en sia hejmlando, sed preskaŭ en la tuta mondo. Li proponis novajn vojojn taŭgaj por la disvastigo de Esperanto sur diversaj niveloj. Pilo-Press kore gratulas al la jubileulo. Lia adreso: Bruno Vogelmann, 718 Crailsheim, Pistoriusstr. 50.

ILUS-kunveno en Hamburgo

Hamburgo (pp) La 2a Laboreja Interparolo de la fakgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvocibernetiko" en la Asocio por Programita Instruado okazos en la UK-kongresejo Congress Centrum Hamburg, salono 12, la 27an de julio, de la 16 - 20 horo. Diskutantoj estos i.a. prof. d-ro Frank, d-ro Maitzen, d-ro Bormann, d-ro Schmid, d-ro Kasselmann.

71 En Hamburgo estas la noktoj longaj "Süddeutsche Zeitung"

Al ĉi tiu kongreso partoprenis 2000 Esperantistoj de 100 landoj. Ĝi estis la plej granda kongreso de Esperanto ĝis nun.

Von unserem Redaktionsmitglied Gert Kistenmacher

Grava artikolo en "Süddeutsche Zeitung"

München/Hamburg (pp). Sub la kvarkolona titolo "En Hamburgo estas la noktoj longaj" "Süddeutsche Zeitung", la konata super-regiona gazeto, publikigis ampleksan artikolon pri la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo. La artikolo prezentas la kongresan programon, sed traktas ankaŭ kritike kaj kun opinio de dubo la celojn de Esperanto. Certe tiu kritiko ne plaĉas al multaj esperantistoj, sed ni devas cedi al la ĵurnalistoj la rajton esprimi sian opinion pri la ŝancoj de Esperanto. La fakto, ke la artikolo aperis sur pago 3 kune kun politika raporto pri la situacio en Portugalio, signifas, ke la redakcio atribuas al Esperanto gravan lokon en la vasta kampo de la internaciaj eventoj. Jam nun multaj personoj kaj instancoj, ne nur en FRG, estas informitaj pri la Universala Kongreso, ĉar Süddeutsche Zeitung estas gazeto, kiun "devas" legi homoj kun certa intelekta nivelo aŭ socia pozicio.

Ke okazis ankaŭ en tiu artikolo misinformado pri la tikla temo "Eminentaj politikistoj kaj Esperanto" estas bedaŭrinda, sed fontas el la konata fakto, ke ĵurnalistoj facile intermiksas al ili nekonatajn aferojn: Tito ne parolis dum la 58a UK en Beogrado, estis la mortinta prezidento Jonas de Aŭstrio, kiu alparolis la Vienan kongreson. Süddeutsche Zeitung de la 17a de julio 74.

Manlibro de varbado

Munkeno (pp) Günter Conrad, D-8 München 83, Kafkastr. 48, kunlabore kun W. Walther, Kronach, eldonis "Manlibron pri varbado", ofsetita broŝuro en formato DIN A 5 kun 79 paĝoj, La prezo estas 5,80 DM. Recenzo sekvos! La broŝuro estas havebla nur de la aŭtoro kaj eldonanto.

+++++

30 jarojn Popola Pollando

Okaze de la 30a datreveno de la fondiĝo de Popola Pollando Pilo-Press esprimas bondezirojn je bonfarto kaj prospero al la pola popolo, el kies mezo devenis ankaŭ la aŭtoro de Esperanto, d-ro Zamenhof. Korajn salutojn ni sendas al la polaj esperantistoj, la Pola Esperanto-Asocio kaj al la Esperanto-redakcio de Pola Radio. Al la Esperanto-redakcio ni dankas pro la ĉiutagaj bonkvalitaj, interesaj elsendoj en Esperanto, per kiuj grave plialtigis la prestiĝo de Esperanto ĉie, kie estas aŭdebla la Esperanto-voĉo el Varsovio.

Efunkciis la kastela horloĝo je la 11,15 horo

Al la legantoj de Pilo-Press ne estas nekonata la historio pri la pereco kaj rekonstruo de la Reĝa Kastelo en Varsovio. La 19an de julio 1974, je la 11,15 horo, denove ekfunkciis la horloĝo de la nun rekonstruita kastelo, je la sama minuto, kiam ĝi haltis en septembra tago 1939. Pri la ceremonio Pola Radio raportis en speciala raporto en Esperanto, same kiel pri la inaŭguro de du gravaj trafikaj vojoj en Varsovio: La Vistula bulvarado kaj la Ĥazienka trako.

Radio Vieno: La venonta elsendo sur meza ondo 203,4 m (regiona programo) estos merkrede, 7.8.74, 13,30-45 horo kun raporto el la germanlingva eldono de Pilo-Press "END".

Pilo-Press en Hamburgo: La redaktoro de Pilo-Press estos de la 22.7. ĝis la 5.8.74 en Hamburgo, de kie ankaŭ eliros Pilo-Press kaj END. Lia adreso: Ludwig Pickel, Hotel "Am Rothenbaum", 2 Hamburg 13, Rothenbaumchaussee 107.